

esperanto aktuala

Revuo de la Esperantista Brusela Grupo

Numero 4 / 2015



arte

LILLE 2015



esperanto



Zaĝemo

Diskonigu ...



EO -n !



Teo kaj Amo



45 multlandaj E-filmoj, kiuj partoprenis konkurson « **Teo kaj Amo** » de Ĉina Radio Internacia, estas spekteblaj interrete. Tio estis verEGe mirinda momento por nia E-kulturo, kiu tre-ege-multe sentas mankon de aŭdvidaj produktaĵoj!

Do, bonvolu spekti kaj ne hezitu disvastigi tiu gravegan iniciaton de Ĉina Radio Internacia .

Jen la ligilo: <http://esperanto.cri.cn/filme/14tea3.htm>



Ankaŭ videbla sur rusa tv-stacio, estas tiu bela kanto «Teo kaj Amo» far muzikgrupo **Sepa kaj Asorti** el Litovio. Ili komponas kaj plenumas kantojn en esperanto kaj aliaj lingvoj. Kanto Teo kaj Amo estas registrita kun Pablo Diaz el Argentino. Ni elkore dankas al Jevgenij Shuklin kaj Jolanta Milashiute pro aktora laboro kaj Anton Shuminskij pro la filmado. Verkis kanton kaj muntis videon Elena (Estela) , violonon kaj gitaron ludis Edgar (Sepa), filmis Edvard kaj Anton.

https://www.youtube.com/watch?v=RC-MF2L_K4#t=154



K O L O F O N O

40a ELDONJARO. **Redaktoroj** : Laurent kaj Samy Loisse : aktuala@esperantobruselo.org ;
 Fondita en 1976, de Léo De Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la
 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo «Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge» kun la n° 0419498274, honorigita kiel
 reĝa societo ek de la 29a de Majo 1957. **Aktuala estas libere elŝutebla tie** : <https://sites.google.com/site/ebgaktuala/>
Prezidanto : JM Nicolas de BUYL : prezidanto@esperantobruselo.org ; **Kasisto** : Jan Amadori jan.amadori@gmail.com
Sekretario : Laurent Loisse sekretario@esperantobruselo.org , **Informoj / kursoj** : Françoise Pellegrin fransuaz@esperantobruselo.org
Eventoj : JM Nicolas de Buyl nikolao@esperantobruselo.org **Retejo de EBG** : www.esperantobruselo.org
Abona membriĝo : 10 aŭ 13 eŭroj jare, konto : **IBAN** : BE87 5230 8055 0794, **BIC** : TRIOBEBB de la Esperantista Brusela Grupo
Kunvenejoj : 1° ĉe «De Pianofabriek» (**DPf**) : Rue du Fort-straat 35, en 1060 Saint-Gilles/Sint-Gillis, Metroo : Parvis de St-Gilles/St-Gillis
 Voorplein 2° ĉe la Eŭropa Komisiono (**EK**) : rue Van Maerlant 2, 1000 Bruselo - Metroo Maelbeek/Maalbeek
 Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala ne nepre spegulas opiniojn de la ĉefa redaktoro aŭ de EBG - Esperantista Brusela Grupo

A G Ĉ N D O



Bonvolu kontroli la ĝisdatigojn sur nia nova retejo : www.esperantobruselo.org

Ĉi-jaron la kunvenoj daŭrigos ĝis la 22a de Julio. Poste ekde la 9a de Septembro.

Ĉiu persono menciita sur la listo por eniri la konstruaĵon estas bonvena

EBG faras alvokon al prelegontoj por plenigi sian kalendaron,
 bonvolu kontakti nikolao@esperantobruselo.org aŭ vespere 0478 382 981

Por vojaĝi kune kaj ĝoje inter, ne forgesu la someran **karavanon** !
<http://www.alesk.eu/karavano/superkaravano2015/>

JULIO



Mer. 1a 18:30-20:00 !! Prelego : Geomar Martínez Pérez **el Kubo**
 (EK) «Kubo : Historio kaj nuntempo»

Ven. 10 > dim. 12 Muzikfestivalo «La Semo» <http://www.lasemo.be/#>

Sab. 11 > dim. 19 Somera Eo Studado (SES) en Martin (Slovakio)
<http://ses.ikso.net/2015/sk/>

Ĵaŭ. 16 > ĵaŭ. 23 Internacia Junulara Kongreso (IJK) Wiesbaden (DE)
<http://ijk2015.tejo.org/>

Ven. 17 > sab. 25 48a ILEI-Konferenco en Ostende (Vizito de Bruselo la 22a)
<http://ilei.info/>

Sab. 18 > dim. 26 SEFT, Somera Esperanto Familia / Feria Tendaro en Thomsdorf (DE)
http://www.esperanto-nb.de/seft/seft_eo.html

Dim. 20 > sab. 25 Antaŭkongresa ekskurso - en **kastelo Greziljono**, Francio
<http://gresillon.org/s2>

Lun. 21 > sab. 25 Bicikla Karavano de Parizo al UK en Lille
<http://bemi.free.fr/eo.html>

Sab. 25 > sab. 1 100a UK en Lille
<http://www.lve-esperanto.org/lille2015/>

AŬGUSTO

Mer. 5 POST-UK en Bruselo : vizito de la urbo kaj ĉokolada muzeo
 Pli da informoj ĉe nikolao@esperantobruselo.org

SEPTEMBRO

Sab. 5 14:00 - 16:00 Konversacia rondo en Dilbeek Lydia Buyst : 054 33 01 51
<http://www.esperanto.be/lokgrup.php#Dilbeek>

Mer. 9 18:30 - 20:00 (EK) : Unua post-somera kunveno : Babilrondo ĉe la **Eŭropa Komisiono**

Mer. 16 18:30 - 20:00 (DPf) : Unuaj kursoj : Eo1 kaj Eo2 en nia nova kursejo «De Pianofabriek»

Saluton Kara Legantaro !



Kelkaj gravaj novaĵoj aperis lasttempe en Esperantio: Tutpozitiva televida elsendo pri Eo ĉe Arte-tv (<http://info.arte.tv/fr/quelle-sera-demain-la-langue-de-leurope>) dum Peko pere de niaj viglaj Verdaj Skoltoj ! Kaj tuj poste aperis la unua kurso de Esperanto sur fama senpaga lernada retejo: Duolingo. Fulmrapide lernantoj aliĝis amase kaj nuntempe Esperanto-lernantoj nombras pli ol 25.000 ! (legu artikolon paĝo 6). Ankaŭ menciindas bonaj rezultoj ĉe Instituto Zamenhof en Togolando, lernejo kie oni instruas Eo-n ĉiutage (paĝo 7).

Krome, nia klubejo grandparte translokiĝos en Septembro en la flandra kulturalejo «De Pianofabriek» por ĉiusemajnaj kursoj kaj kunvenoj.

Tio ne estas 100% certa nuntempe sed preskaŭ konfirmita.

EBG daŭras havi lokon en la Eŭropa Komisiono tamen krom la ferioj, kursoj kaj kunvenoj okazos en De Pianofabriek, rue du Fortstraat, 35 en Bruselo.

Bonan legadon al ĉiuj !

Viaj redaktoroj

aktuala@esperantobruselo.org



Enhavo

- Paĝo 2 : Teo kaj Amo
- Paĝo 3 : Kolofono kaj Agendo
- Paĝo 4 : Edito kaj Enhavo
- Paĝo 5 : Intervjuo Du, Verdaj Skoltoj
- Paĝo 6 - 7 : Duolingo, jam 25.000 lernantoj
- Paĝo 8 - 9 : Instituto Zamenhof en Togolando
- Paĝo 10 - 11 : La Oka Pordo (3/4)
- Paĝo 12 : La Oka Pordo
- Paĝo 13 : Lingva festivalo en Sankt-Peterburgo
- Paĝo 14 - 15 : Esperantlingvaj elektoafiŝoj en Barcelono
- Paĝo 16- 17 : La gepatraj eksterlandoj de niaj komencintoj
- Paĝo 18 - 19 : PSI-raporto, Liba
- Paĝo 20 : PEKO





Intervjuo du, Catherine, patrino de Dingo

Saluton Catherine,

1) Do vi estas patrino de iu verda skolto. Ĉu vi povas prezenti vin? vian familion?

Mi estas franca. Mia edzo estas francparolanta Belgo. Ni ambaŭ lernis Esperanton kiam ni estis junaj plenkreskuloj. Ni neniam vere uzis ĝin en la ĉiutaga vivo (krom dum renkontoj) sed ĝi ja estas parto de nia identeco.

Ni havas tri gefilojn : Élise 19-jara, Simon 17-jara kaj Emma, kiu ĵus fariĝis 15-jara.

Ni loĝas en franca urbeto, Givet, ĉe la belga landlimo.

2) Kiel kaj kiam viaj infanoj ekpartoprenis la verdajn skoltojn ?

Antaŭ kelkaj jaroj, Valère kontaktis nin prezentante sian projekton pri verdaj skoltoj. Skoltajn movadojn ni ne tre bone konis kaj neniu el niaj gefiloj estis partopreninta skoltan renkonton antaŭe. Tamen tuj allogis nin la ideo renkontigi gejunulojn parolantajn malsamajn lingvojn. Mi opiniis, ke en tiaj renkontoj Esperanto montros sian utilon kaj taŭgecon.

Krome, en mia menso la skolta movado ligiĝis kun ne ĉiam komfortaj kaj facilaj vivkondiĉoj, elturniĝemo kaj vivo en la naturo, kio laŭ mi estas spertenda por maturiĝi kaj malfermiĝi.

En la komenco, niaj tri gefiloj, Élise, Simon kaj Emma partoprenis la aranĝojn, Simon plej entuziasme.

La knabinoj rapide ĉesis partopreni (Élise ĉar ŝi iĝis tro aĝa kaj Emma ĉar ŝi estis for en Germanio dum tri monatoj kaj poste akceptis sian korespondantinon) sed Simon pli kaj pli ŝatis la renkontojn kaj la grupon.



3) Kion Simon lernis ĉe la skoltoj? Kion la verdaj skoltoj alportis al li? Ĉu vi vidis ŝanĝojn ĉe li? (krom la plenkotajn vestaĵojn)

Ĉu tio influis lian personecon? Certe! Unue rimarkeblaj estas liaj lingvaj progresoj: dum li ne estis aparte lingvama, li akiris memfidon kaj guston rilate lingvojn (Esperanton kaj eĉ ankaŭ la germanan kaj la anglan). Liaj lingvaj kapabloj pliboniĝis laŭ mi pro tri kialoj:

- li havis regulajn okazojn praktiki dum la renkontoj, kaj eĉ inter la renkontojn per la reto.

- pro la amikaj rilatoj, li havis la instigon lerni : li do lernis per si mem, eklegis librojn, enskribiĝis ĉe [LERNU](#).

- ankaŭ pro la amikaj rilatoj kaj bona etoso, li ne plu timis paroli.

Memfidon li akiris ne nur lingve sed ankaŭ ĝenerale, pro la amikecaj, gajaj, malfermitaj rilatoj kun junuloj kaj aparte junulinoj. Kaj ankaŭ ĉar li iĝis pli elturniĝema (li iĝis kapabla vojaĝi sola en fremdaj landoj, konstrui meblojn el ligno, zorgi pri kuirado kaj purigado....).

4) Ĉu vi konsilos al aliaj gepatroj sendi iliajn infanojn ĉe la verdaj skoltoj?

Mi konsilus al ĉiuj infanoj travivi tian sperton: ĝi estas kvazaŭ salti el la hejma nesto kaj ekflugi, ne sola sed kun novaj geamikoj, malkovrante la mondon kaj sin mem. Ĝi certe ne estas la sola maniero malfermiĝi kaj trapasi la malfacilajn adoleskantajn jarojn kaj eble ĝi ne taŭgas por ĉiuj ; sed por tiuj kiuj ŝatas, kiel Simon, la renkontoj de la Verdaj skoltoj multe helpas kreski kaj naskas amikajn rilatojn, tiom gravaj por la tuta vivo. Koncerne Esperanton, tiuj renkontoj montras plej elokvence ĝiajn valoron kaj taŭgecon.

Jam 25 000 lernantoj de Esperanto ĉe Duolingo

Ĉi-matene la Esperanto-kurso por angle-parolantoj en la lingvolerna retejo Duolingo atingis 25 000 lernantojn. Tio estas fulmrapida evoluo dum nur du semajnoj ekde ĵaŭdo, 28-a de majo.

Ĉu vi vere pretis kredi tion, kiam unue la iniciatinto de [Duolingo](#), Luis von Ahn, en prelego flanke menciis antaŭ tri jaroj, ke homoj petadas Esperanto-kurson? Kiam poste estis voĉdonadoj, kiu lingvo aldoniĝu, kaj Esperanto estis pli kaj pli favorata... Kiam fine en septembro 2014 internacia teamo sub gvido de Chuck kaj Ruth Keves-Cohen komencis adapti la Duolingo-kurson al Esperanto... Sed ja okazis!

Fakte la kurso allogas ne nur lernantojn – ĝi eĉ kreas verajn Esperanto-parolantojn post kompleta tralaborado de la ekzercoj. Rigardu ekzemple la [intervjuon](#) kun la nederlandanino Marijke post ses tagoj da lernado.

La prezidanto de TEJO, Łukasz Żebrowski, komentas:

– La nombro de eklernintoj de Esperanto en Duolingo estas vere impona! Ni aŭdis, ke estis multaj petoj al Duolingo pri Esperanto, sed ni ne supozis, ke la interesiĝantoj tiom rapide iĝos realaj lernantoj.

TEJO aparte prizorgos la kurso-partoprenantojn:



– Al ĉiuj, kiuj pretas provi sian lingvokonon, ni ĝojas sendi ciferecan numeron de nia socikultura revuo Kontakto. Ni tre ĝojas, ke ni povas kontribui al ĉi tiu sukceso, kaj ni invitas ĉiujn daŭrigi sian aventuron kun Esperanto!

Memoroj pri la propra iama entuziasmo dum eklernado de Esperanto leviĝas ĉe Bertilo Wennergren, aŭtoro de la “Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko”:

– Kiam mi vidas la reagojn kaj entuziasmon de centoj kaj miloj da studentoj ĉe Duolingo, mi profunde memoras, kiom da plezuro mi mem havis eklernante la lingvon. Mi preskaŭ envas la lernantojn ĉe Duolingo, ĉar ili havas tiun brilan ilon je dispono. Mi preskaŭ deziras rekomenci.

Nu, fakte eĉ altnivelaj Esperanto-parolantoj

bonvenas por trairi la lecionojn kaj proponi plibonigojn.

Benny Lewis el Irlando estas aŭtoro de la internacia furorlibro pri lingvolernado “Fluent in 3 Months” (Fluparolanto en tri monatoj). Li komentas:

– Esperanto estas la plej facila lingvo en la mondo kaj Duolingo estas unu el la plej bonaj senkostaj rimedoj por lerni lingvojn. Jen perfekta paro!

Se oni komparas la kurson de Duolingo kun aliaj retaj lingvokursoj, indas konstati, ke Duolingo instruas proksimume 2 000 vortojn kaj do estas kurso por komencantoj kaj progresantoj, eble eĉ proksima al

konversacia nivelo. Por kompreni, kion la nombro signifas: La kurso “Ana Pana” ĉe lernu.net instruas proksimume 250 vortojn, la fama Zagreba kurso instruas proksimume 550 radikojn, per kiuj oni kutime formas eble iom malpli ol mil vortojn.

Sed pli bone ol nombroj la nivelon eble ilustras kelkaj frazoj el la kurso:

- Ĉiu persono, kiu lernas la lingvon, kontribuas al ĝia sukceso.
- Eĉ se ŝi ne parolas la japanan, ŝi tamen parolas la ĉinan.
- Se vi volas scii pli pri ĉi tiuj programoj, vi devus demandi al mia edzino.
- Ĉu vi povus diri al mi, ĉu estas eraroj en tiu dosiero?

Se vi jam havas scion pri Esperanto, vi povas fari komencan teston, kiu atribuos al vi certan nivelon. Se vi poste konstato, ke vi estas eĉ pli bona ol tio, vi povos denove fari testojn pri unuopaj lecionaroj – kaj vi trasaltos fulmrapide eble dekon da lecionetoj.

Jen cetere jam [listo de Duolingo-vortoj en Esperanto ĉe Memrise](#), (lingvo)lerna retejo, kiu helpas vin ripetadi vortoscion.


Eble vi demandas vin, kiel vi mem povas subteni tiun grandan sukceson kaj progreson. Nu, estas ĉefe tri aferoj: Se vi ŝatos helpi al lernantoj ĉe iliaj demandoj, iru al “[Esperanto Discussions](#)”, kie ofte mankas helpo de sperta Esperanto-parolanto. Se la simbola frazoveziko enhavas la ciferon 1, tio signifas, ke venis nur la demando, sed neniu respondo. Helpo do bezonata!

Krome nun jam estas tempo pli vaste publikigi la informon pri la Duolingo-kurso – ene de niaj rondoj kaj ankaŭ al la ekstera mondo. Ĉe tio ni konsciu, ke temas pri kurso por angle-parolantoj. La angla fakte ne nepre estu la denaska lingvo de la lernanto, sed ja necesas havi iom bonan nivelon en ĝi. Preskaŭ ĉiuj nendenaskuloj konfesas, ke de tempo al tempo ili malsukcesas ĉe iu Duolingo-ekzerco ne pro Esperanto, sed pro erara frazo en la angla... Tio povas iom ĝeni, sed tamen multaj nendenaskuloj kun iom da pacienco (kaj preteco plulerni la anglan...) sukcesis progresi en la kurso kaj eĉ fini ĝin.

Bv legi ceteron surrete: <http://www.liberafolio.org/jam-25-000-lernantoj-de-esperanto-ĉe-duolingo>



Lu Wunsch-Rolshove



The addition of Esperanto on Duolingo has me really excited. This is because, I can foresee Esperanto as being an “intermediate language” on Duolingo for which you can learn, and then move to any other language through. (...) <http://www.moosader.com/2014/10/7-better-reasons-to-learn-esperanto/>



Rave, brave, prave, Instituto Zamenhof !

Instituto Zamenhof estas la lernejo en Togolando, kie oni instruas Esperanton dum normalaj kurshoroj. Tie sidejas ACE (Afrika Centro Esperantista), kiu energie kunlaboras kun UETA (Unuiĝo de Esperantistoj en la Tuta Afriko) por la organizado de la 6a AKE (Afrika Kongreso de Esperanto) en Togolando en decembro 2015. Ĉar ne nur Esperanton oni instruas tie, decas paroli ankaŭ pri ekzameno neesperanta. Io ĵus okazis. Malkvoru mem !



Rave, brave, prave, Instituto Zamenhof !

Se la nombro de sukcesintoj por la tuta ekzamencentro kun 320 ekzamenitoj el dek lernejoj estas 56, kaj Instituto Zamenhof (IZ) sola havas 31, tio estu demandiga. Ĉu la gvidantoj de IZo havas sekreton ? Eble oni memorus demandon de Mauro LA TORRE al GBEGLO Koffi dum la Uko de Roterdamo en 2008 : "Kion apartan Esperanto alportas al la gelernantoj, ke ili ĉiam superas gelernantojn de aliaj lernejoj en Togolando ?".

La respondo troviĝas en la aprila numero ĉijara de la revuo «Esperanto». Malkovrindas la ĵus okazinta ekzameno.

De la 10a ĝis la 12a de junio 2015 okazis en Instituto Zamenhof provekzameno por la gelernantoj de dek lernejoj grupiĝintaj en G10 (grupo el dek lernejoj). La ekzameno koncernis gelernantojn de mezgrada nivelo, kiuj fine de la monato junio, trapasos la ŝtatan ekzamenon BEPC. Preparoj al tiu ĉi ekzameno okazigas provajn kaj tio ĵus okazis. Kiuj estas la rezultoj ?

Jen la rezultoj laŭ la lernejo

(Nomo de la lernejo: nombro de enskribintoj/ nombroj de ekzamenitoj/ nombro de sukcesintoj/ procento de sukceso):

AUDACE : 12 / 12 / 1 / 8,33
AUORE : 32 / 32 / 4 / 12,50
BERGERE : 44 / 44 / 3 / 6,82
LIAHONA : 22 / 22 / 3 / 13,64
MONTESQUIEU 2 : 44 / 43 / 4 / 9,30
NAK : 59 / 58 / 4 / 6,90
POLYVALENCE : 37 / 36 / 4 / 4,76
THALES : 2 / 2 / 0 / 0,00
TRONE DE DIEU : 28 / 26 / 2 / 7,69
ZAMENHOF : 45 / 45 / 31 / 68,89
TUTA EKZAMENCENTRO : 325 / 320 / 56 / 17,50



Jes, ja ! Io aldonindu !

La lernanto kun la plej alta poentaro estas **TCHITCHIRA Kossi Isaac** de Instituto Zamenhof. Li atingis 16,38 poentojn el 20. Inter la dek kandidatoj kun plej bonaj rezultoj troviĝas sep de Instituto Zamenhof. La kandidato kun la plej malalta poentaro de la ekzamencentro atingis 2,69 kaj okupas la rangon 320an. Estus bone scii ankaŭ la lernanton, kiu havas la plej malaltan poentaron inter la kandidatoj de Instituto Zamenhof. Tiu kandidato estas **HLIDJA Komi** kun 6,63 kaj la rango 222a de la tuta ekzamencentro. Komi multe superas la lastrangan kandidaton de la ekzamencentro, kiu atingis 2,69 poentojn kun la 320a rango.

la gvidantoj de Instituto Zamenhof povis jam antaŭe rekoni gelernantojn kun ne bona nivelo. Al tiuj dek ok gelernantoj estas organizata aparta subtenkurso. Tio igas, ke kvar el ili sukcesis. la subtenkurso pluiras ĝis la ŝtata ekzameno kaj esperindas, ke la rezulto estos multe pli bona. Kaj la sekreto ?

Ho jes, la sekreto ! Ĝi troviĝas en la aprila numero de la revuo «Esperanto». Jen !



Spirito de la lernado en Insituto Zamenhof

La rimarkoj, kiujn mi nepre farus al kandidatoj estas:

1. Konsciu ke ni faras ne ordinaran lernejon, sed modelan lernejon.
2. Necesas krom faka kompetenteco de la instruisto ankaŭ aliaj ecoj:
 - instrui en spirito de toleremo kaj frateco
 - instrui en spirito de scivolo pri la mondo, la homo kaj la naturo
 - instrui kun ĉiama atento al sano, higieno kaj ordo
 - instrui pedagogie: t.e. ne per punado sed per kuraĝigado
 - instrui kunlaborante kun la plej maturaj lernantoj
 - instrui uzante interreton por tutmondaj kontaktoj, i.a. per Esperanto
 - ne nur instrui sed ankaŭ labori por ke la lernejo enspezu ekonomie
 - krei kun la lernantoj kaj la kolegoj komunumon por la plu-ekzistado de la lernejo
 - serĉi bonajn rilatojn de gepatroj, por ke tiuj interesiĝu pri la lerneja vivo
 - kaj helpu ĝin
3. Oni lernas ne por la diplomo sed por la vivo.


Tial, Instituto Zamenhof ĉiam havas 100% da sukceso ĉe la elementa nivelo, kaj almenaŭ 85% ĉe la duagrada nivelo.



<http://www.ipernity.com/blog/gkp/1044802>

La oka pordo 3/4

Tiun ĉi radiodramon verkis kaj produktis Luiza Carol
[Upload Music Files - Upload Audio - La oka pordo 3/4](#)



Maat: la antikva egipta diino de justeco, kun la "plumo de vero" surkape.

Dua sceno: "EN LA TRONSALONO DE RA"

BES: Gratulon! Vi jam sukcesis pasi tra la 7 pordoj! Nun ni troviĝas en la salonego de la ĉiopova Ra. Rigardu! Apud li estas la sankta juĝisto: la brilanta Maat kun sia pesilo. La best-vizaĝa dio en la alia flanko estas la malica Set. Ne timu lin. Li ne kapablos nuligi viajn 7 atestilojn, subskribitajn de 7 pordogardistoj.

AIDA: Sed... sed... kio okazos se...

BES: Ssst... silentu... Tuj ekparolos Ra!
[paŭzo kun muziko]

RA: Brilanta Maat, vi povas komenci la juĝceremonion.

MAAT: Dankon al vi, ĉiopova Ra. Mi petas ricevi la atestilojn de la du kandidatoj.

BES: La kandidatoj petas, ke oni juĝu ilin kune, ĉar ili volas kundividi la saman sorton.

MAAT: Konsentite.

RA: Konsentite.

BES: Jen la 7 atestiloj, subskribitaj de la pordogardistoj.

MAAT: Ni vidu... Laŭ tiu ĉi dokumento, Aida kaj Radames kantis kaj poemumis antaŭ la Magia Pordo de Ĉiela Muziko kaj la Magia Pordo de Ĉiela Poezio, ĝis iliaj lumoj kaj ombroj kapablis transpasi la koncernajn pordojn. Atestas pri tio la pordogardistoj Haŭtaŭskultulo kaj Brizkaresulo.

RA: Pli rapide! Pli rapide!

MAAT: Sekve, la pordogardistoj Muzikvaporulo kaj Muzikflorflarulo atestas pri tio, ke Aida kaj Radames dancis kun bonodoraj floraranĝoj antaŭ la Magia Pordo de Ĉiela Dancado kaj la Magia Pordo de Ĉiela Aromarto, ĝis iliaj korpoj kaj esencoj kapablis transpasi la koncernajn pordojn.

RA: Pli rapide! Pli rapide!

MAAT: Jen alia dokumento, atestanta ke Aida kaj Radames ornamis maskojn, kiujn ili surmetis por deklami antaŭ la Magia Pordo de Ĉiela Pentroarto kaj la Magia Pordo de Ĉiela Aktorado, ĝis iliaj nomoj kaj memoroj kapablis transpasi la koncernajn pordojn. Subskribas la pordogardistoj Frostmuzikvidulo kaj Aliformiĝulo.

RA: Pli rapide! Pli rapide!

MAAT: La lasta atestilo informas nin, ke Aida kaj Radames bakis bongustajn kukojn antaŭ la Magia Pordo de Ĉiela Kuirado, ĝis iliaj koroj kapablis transpasi la koncernan pordon. Subskribas la pordogardisto Kantmanĝulo... Bone. La sep atestiloj validas. Ni daŭrigu la ceremonion.

SET: Haltigu la ceremonion! Ĉi tie okazas kontraŭleĝa komploto! Ĉi tie okazas herezo!!!

RA: Trankviliĝu, Set. Trankviliĝu. Kiu komploto? Kiu herezo?

SET: Ĉi tiu herezulo, ĉi tiu fripono, ĉi tiu malbenita klaŭno Bes... aŭdacis malrespekti la sanktajn leĝojn pri la subgrundaj pupspektakloj! Mi havas pruvojn! Mi filmis ĉion per mia ĉiela filmilo.

RA: Ĉu vere? Sed kion faris Bes, sen mia scio?

SET: Bes primokis la neŝanĝeblajn leĝojn pri la glora akiro de senfina libereco! Li intermiksas la sanktajn subgrundajn leĝojn kun la sanktaj surgrundaj leĝoj!! Mi ĉeestis kaj filmis ĉiujn subgrundajn pupspektaklojn antaŭ la 7 pordoj. Ili estis gajaj, muzikoplenaj, similantaj surgrundajn spektaklojn...

RA: Ha, ha, ha! Ĉu vere? Ha, ha, ha!

BES: Mi volis nur ŝerci, via moŝto... Mia eterna tasko estas distri diojn kaj homojn...

SET: Li volis ŝerci! Li konfesas, ke li herezis! Li konfesas!

RA: Ha, ha, ha...

SET: Bes subaĉetis la sep gardistojn, kiuj ŝajnigis nerimarki la herezon. Mi postulas justecon. Mi postulas punon por la senhonta klaŭnaĉo! Kaj punojn por la sentaŭgaj pordogardistoj!

RA: Trankviliĝu, Set. Bes faris amuzan ŝercon. Jen ĉio.

SET: Li faris kontraŭleĝan ŝercon!

RA: Silentu, Set. Sufiĉas. Mi estas la ĉiopova Ra, la sundio, la leĝfaranto. Mi povas ŝanĝi la leĝojn laŭ mia plaĉo. Ekde nun, ekfunkcios la oka pordo antaŭ la sojlo de la juĝsalono... *[paŭzo]*

(daŭrigota)

Sankt-Peterburgo : Rekorde granda lingva festivalo



LF en Peterburgo: Prezento de Esperanto vekis grandan intereson (Foto: Sergej Andrejsons)

Preskaŭ duonmilo da vizitantoj partoprenis la 9an lingvan festivalon en Sankt-Peterburgo – normale la kvanto estis duoble malpli granda. La gastoj partoprenis la 56 festivalajn eventojn, ĉefe prezentojn de apartaj lingvoj, sed ankaŭ prelegojn pri lingvistikaj temoj.

La lingva festivalo estas koncepto de porekstera agado, kiun elpensis kaj ekuzis la usona esperantisto kaj profesia merkato Dennis Keefe. Esence ĝi estas aro de enkondukaj lecionoj pri dekoj da lingvoj, ili okazas en kelkaj blokoj po kelkaj prezentoj-lecionoj samtempe. Partoprenantoj elektas lingvon inter kelkaj kaj konatiĝas kun ĝi de sperta gvidanto (denaska parolanto, fakulo aŭ studanto de la lingvo).

La festivalo, okazigata en Sankt-Peterburgo fare de lokaj aktivuloj de Rusia Esperantista Unio, celas disvastigon de konscio pri la lingva diverseco en la mondo kaj Ruslando speciale, zorgigon de la publiko pri perspektivoj de malpli grandaj lingvoj, komprenon pri ebleco studi kelkajn lingvojn samtempe.

En moderna Ruslando, samkiel plurloke en la mondo, la angla iĝis sinonimo de “fremda lingvo” en mezlernejoj kaj laborlokoj. Ofte homoj ne decidiĝas eklerni alian lingvon, ĝis kiam ili “finlernos” la anglan. Nur 5% da ruslandanoj menciis en la tutlanda censo de 2010, ke ili “scias” la anglan.

Esperanto estis prezentita en ĉi-jara festivalo dufoje, la prezenton faris Vjaĉeslav Ivanov. Krom tio okazis ankaŭ aparta evento “Esperanto-klubo”, en kiu dezirantoj povis interparoli en Esperanto – la kluban programeron preparis Miĥail Kolodin. Esperanto estis multe menciita ankaŭ en la prezento de German Dudĉenko, kiu prelegis pri la esperantido Omo, iom populara en la soveta Uralo komence de la 20a jarcento.

La festivalo, kiun la 15an de marto gastigis la Nacia Esplora Universitato de Informaj Teknologioj, Mekaniko kaj Optiko (ĝuste en ĉi marto ĝi festis sian 110-jariĝon), estas malfermita al publiko; la eniro kostis neniom, plejmultis junaj partoprenantoj, sed rimarkeblis homoj de ĉiuj aĝoj. Laŭ enketado, homoj venas ĉefe pro scivolemo sen antaŭa lingvistika fono. La plej ofta kritiko estas manko de tagmanĝa paŭzo, kion la organizantoj taksas laŭdo.

Vjaĉeslav Ivanov

La Balta Ondo <http://sezonoj.ru/2015/03/peterburgo/>



Unua kunsido de nepalaj esperantistoj post la lastaj tertremoj



Nepala Esperanto-Asocio (NEspA) okazigis sian unuan kunsidon post la tertremoj, kiuj trafis tiun landon dum la lastaj monatoj.

Kelkaj membroj ne kuraĝis kunveni. Iuj eĉ ne volis iri en la kvartalon, en kiu situas la sidejo de tiu institucio.

Fine, oni decidis estigi la kunsidon en restoracio, situanta en la ĉefurbo, Kathmandu. Tie ĉiuj neeviteble parolis pri la lastaj bedaŭrindaj okazintaĵoj.

La sidejo de Nepala Esperanto-Asocio troviĝas en la kvara etaĝo de konstruaĵo, situanta en la komerca

kvartalo Thamel. Laŭ informoj konigitaj de tiulandaj esperantistoj, la tiea registaro malpermesis la eniron en tiun lokon.

Lastan semajnon tamen la esperantisto Pradip Ghimire sola vizitis la sidejon de NEspA. Li rakontis, ke ŝajne la konstruaĵo staras firme, sed interne de la esperantista oficejo ĉio estas malorde. Libro, elektronikaj aparatoj kaj aliaj havaĵoj falis surplanken post sinsekvaj seismaj skuoj, kaj li timis resti tie pli longan tempon.

Kelkaj membroj de NEspA sugestis, ke la asocio translokigu sian sidejon al propra terspaco. Ĝi situas 9 kilometrojn for de la nuna konstruaĵo.

Lanĉiĝis la 2^a Muzika Konkurso de la revuo Kontakto

<http://esperantoilustrita.blogspot.com.br/2015/05/unua-kunsido-de-nepalaj-esperantistoj.html>

Post la pasintjara unua sukcesa realigo, la revuo *Kontakto*, TEJO kun apogo de UEA relanĉas la 2^a Muzikan Konkurson de *Kontakto*! Kun la celo plenigi la truon, kiun lasis la forlaso de la branĉo "Muziko" el la Belartaj Konkursoj de UEA kaj premii la talentojn de niaj artistoj. Ĉi-jare la konkurso estas dividita en tri kategorioj: Kanto de la Jaro, Premio de la publiko kaj Nova Talento

La regularo estis aktualigita por ĉi tiu 2^a konkurso. La premio "Albumo de la jaro" estis antaŭigita de la premio "Nova Talento", kiu premias la plej bonan kantaĵon de artisto neniam antaŭe lanĉinta albumon kaj neniam antaŭe ricevinta premion en tiu ĉi konkurso.

En 2014 partoprenis 16 konkursaĵoj el konataj kaj novtalentaj artistoj. La premiojn ricevis La Perdita Generacio kaj Barok'.

Pliajn detalojn kiel partopreni vi trovos en la [regularo](#)! Disvastigu la informon!

**2^a Muzika Konkurso
de la revuo Kontakto**

Esperantlingvaj elektoafiŝoj en Barcelono

Unu el la ĉefaj kandidatoj por la urbestra posteno en Barcelono uzas Esperanton en sia elektokampanjo. Ŝiaj multlingvaj reklamafiŝoj montras sloganojn kiel “Ili volas nin solaj – ili vidos nin kunaj” kaj “La demokratia revolucio apartenas al ĉiuj”. José Antonio del Barrio esploris la fenomenon.



La bildoj en ĉi tiu artikolo montras balotafiŝojn, nun videblajn en la stratoj de Barcelono. La vizaĝo estas tiu de politikisto kiu havas realajn ŝancojn fariĝi urbestro de Barcelono post la municipaj balotoj okazantaj la venontan dimanĉon 24-an de majo. Ŝi nomiĝas Ada Colau (elp. Kolaŭ) kaj la listo per kiu ŝi kandidatas nomiĝas “Barcelona en Comú” (mallonge BeC), esperantigebla per, proksimume, “Barcelono kolektive”.

La politika vivo en Hispanio preskaŭ certe estos renversita dum venontaj balotoj. La reveno al la demokratio konsistis el longa periodo de neperfekta dupartiismo, dominata de du grandaj politikaj partioj, la Popola Partio dekstre, kaj la Socialista Partio centre-maldekstre, kun la aldono de diversaj regionismaj partioj en diversaj landopartoj, plus alia iom pli radikala Unuiĝinta Maldekstro, kun relative granda procentaĵo de voĉdonoj sed malmultaj deputitoj.

La ekfrapo de akuta ekonomia krizo kaj la malkovro de gravegaj epizodoj de politika koruptado kiu trafis preskaŭ ĉiujn tavolojn de la povo, skuis la tutan sistemon kaj sekvigis reage la eksplodon de la movado konata kiel “la 15-M” aŭ “la indignuloj”, en preskaŭ tuta Hispanio, kaj la kreskon de la nombro da partianoj de suverenismo, en Katalunio. Kio komence aspektis ĉefe protesta movado, fariĝis politika tendenco post la kreado de nova partio “Podemos” (“Ni povas”), kiu surprize atingis trian lokon en la eŭropa balotado kaj poste en la regiona andaluza.

“Podemos” okupas pozicion ĉefe en la maldekstra parto de la politika spektro, similan al tiu okupata de la nun reganta partio Siriza en Grekio, sed preferas insisti pri temoj denuncantaj la nunan politikan sistemon kaj la ĝeneralan strukturon de la povo. Ĝi firmigis sian strukturon kaj sintenon dum la lastaj monatoj, kaj prezentis kandidatecon en la regiona balotado, okazanta samtempe en 13 aŭtonomiaj regionoj. Tamen, Podemos preferis ne utiligi sian strukturon kaj nomon rekte en la municipa balotado, interalie por doni lokon ankaŭ al kandidatoj el aliaj maldekstremaj partioj.

Anstataŭe oni kreis apartajn kandidatlistojn en ĉiuj ĉefaj urboj. La listo kelkfoje prenas la formon de nova instrumenta partio, aliloke aranĝiĝas kiel koalicioj aŭ sociaj kandidatiĝoj. La afero estas sufiĉe komplika en tiu spektro, kaj ne ĉiam la balotantoj havas klaran ideon pri la nomoj kaj personoj kiuj estas apogataj de ĉiu movado.

La afero estas speciala en Barcelono, kiu fakte “inventis” tiun sistemon. Tie la homoj

politike proksimaj al “Podemos”, al la partioj devenantaj el la katalunaj sekcioj de Unuiĝinta Maldekstro kaj aliaj, grupiĝis ĉirkaŭ platformo nomata “Guanyem Barcelona” (“Ni gajnu Barcelonon”). Ni notu ke la politika panoramo estas tre speciala en Katalunio, kie al la tipa dekstra/maldekstra divido oni devas aldoni la akson hispaniismaj/kataluniismaj partioj. La platformo iel rompita ambaŭ aksojn, kaj sin prezentas kiel movadon por solvi aferojn de la popolo ĝenerale.

La platformo grupiĝis ĉirkaŭ unu el la plej prestiĝaj kaj karismaj homoj aperintaj post la lastaj sociaj bataloj: Ada Colau, proparolanto de la asocio “Platformo por damaĝitoj pro la hipotezado”, unu el la plej sukcesaj sociaj movadoj, pledanta por la viktimoj de la plej videbla fenomeno de la ekonomia krizo en Hispanio: la familioj elpelitaj el siaj domoj pro la malkapablo pagi la domŝuldojn.

Kun la adekvataj interkonsentoj, estas realaj ŝancoj ke Ada Colau povus fariĝi la venonta urbestro de Barcelono, unu el la plej gravaj urboj en okcidenta Eŭropo.

La kandidataro de BeC prenis plurajn sociajn celojn kiel siajn, flankenmetante la plej kutimajn luktojn en la ĝisnuna politika areno. Ili organizis siajn proponojn kaj sian programon per t.n. aksoj, strukturoj neformalaj kaj kunlaboremaj, kovrantaj diversajn sociajn aspektojn. Ekzemple, ili fokusis sian atenton malpli en la suverenista debato, sed ili faris veton por la problemoj de la migrantoj kaj la multlingvismo de la barcelona socio.

La tiel nomata Akso pri Migrado

proponis la enkondukon de afiŝoj kaj aliaj kampanjaj materialoj en la lingvoj de la komunumoj de enmigrintoj en Barcelono, de la plej parolataj, kiel la angla, la araba, la urdua aŭ la ĉina, ĝis pli minoritataj kiel la

rumana, la gvarania aŭ la amaziĥta (berbera), kaj eĉ respektante diversajn dialektojn kaj lingvajn variantojn. Tio ne nur montras fokuson sur la multlingvismon mem, aferon tre gravan kaj kontestatan en la kataluna socio, sed ankaŭ solidarecon kun tiuj komunumoj, kiuj, eĉ se ĝenerale ne voĉdonantaj en tiaj ĉi balotadoj (nur la civitanoj de la Eŭropa Unio havas tiun rajton) jam iĝis parto de la barcelona socio.

En tiu kunteksto, esperantistoj ligitaj al tiu movado proponis la eldonon de la afiŝoj ankaŭ en Esperanto, por videbligi la strebadon al akceptemo kaj multlingvismo. La respondeculoj de la “Akso” tion rapide aprobis, kaj nia lingvo eĉ aperas sur la unua loko en la [retejo](#) de la kampanjo.



Bonvolu legi la ceteron surrete:

<http://www.liberafolio.org/esperantlingvaj-elektoafisoj-en-barcelono>

Toño del Barrio

La gepatraj eksterlandoj de niaj komencintoj



Mia familio venas de Nagasaki en la sudo de Japanio. Tie estas la maro kaj montoj. Estas speciala urbo konata pro siaj bonaj kuiradoj kaj pro la atom-bombo. Mi ŝatas la domon de miaj avoj. Estas tradicia ligna domo kun paperpordoj kaj tatamoj. Mi ŝatas la odoron kaj la etoson de la domo. Tre grava momento de la tago estas la bano. Oni lavas sin ekster la banujo kaj poste eniras la banujon, ne por lavi sin sed por malstreĉiĝi. Kelkfoje mi banas min kun miaj amikoj, ofte kun mia familio. La rilato kun la korpo kaj nudeco estas tre malsama ol tiu de Eŭropo.

En Japanio, la urbo estas plena de grandaj konstruaĵoj, de personoj kaj magazenoj ĉiam malfermitaj. Sed la kontrasto estas okulfrapa ĉar, tiuj grandaj urboj estas tute apud sovaĝa naturo. Ne estas transiro inter la urbo kaj la naturo : oni pasas rekte al la montoj kun ursoj, aproj, maljunaj arboj. En Japanio, dum la tuta tempo estas la bruoj.

En urbe, estas aŭtoj, muziko en la strato, parolantaj reklamoj, maŝinoj. En la kamparo estas ĉiam ranoj kaj cikadoj. Estas lando kie oni sentas sin sekura. La homoj estas tre ĝentilaj. Ili ege miras kiam ili vidas fremdulojn kaj eĉ pli kiam ili aŭdas ilin paroli la japanan lingvon.

Itsana

Mia patro nomiĝas Filip. Filip naskiĝis en Gvadelupo, (kiu estas) malgranda franca insulo de la Karibio. EN Gvadelupo loĝas pli ol 400 000 loĝantoj sur 1628 kvadrataj metroj. Laŭ mia kuzino, Gvadelupo signifas « belajn akvojn », kaj, efektive, ĝi estas tre bela lando.

Gvadelupo estas vulkanlando, ĉar ekzistas « la Sufrier » vulkano. Pro tio, Gvadelupo havas kelkajn nigrajn plaĝojn. Sed, kompreneble, ekzistas ankaŭ mirindaj faŭno kaj flaŭro . Ekzemple, Gvadelupo havas la plej grandan naturan rezervejon de igvanoj el la mondo. La ĉefurbo de Gvadelupo, Point-à-Pitre, aŭ « Lapuent », nuntempe havas gravan novaĵon, ĉar la plej granda muzeo el la mondo pri tutmonda sklaveco estas malfermata.



Mi vizitis Gvadelupon plurajn fojojn, kaj mi ŝategas tiun landon. Miaj plej ŝatataj aktivecoj estas promeni en la arbaroj, bani min en la maro, kaj gustumi la frandan gastronomion. Mi vizitis iam muzeon pri lokaj bestoj. Mi timis la multajn insektojn kiujn mi vidis, kiel la terurajn araneojn ! Plie, miaj parencoj rakontis min ke ili jam vidis tiun aŭ tiun ĉi insektojn en sia domo. Mi ne plu volis reveni al ilia hejmo !



Kiam mi estis pli juna, mi volegis lerni la lokan kreolan lingvon. Sed mia patro neniam lernigis min. Fakte, la kreola lingvo longtempe estis konsiderita de la supraj sociaj klasoj kiel malbona lingvo. Mia avino ne konis la kreolan lingvon, kaj poste ŝiaj naŭ gefiloj, kiuj lernis la kreolan lingvon en la ludejo, lernigis ĝin al la patrino. Iam kiam ŝi estis pli juna, mia kuzino parolis la kreolan lingvon antaŭ sia propra avino. Ŝi tre ĝuste memoras tiun momenton, ĉar ŝia avino vangofrapis ŝin ! Nuntempe, la kreola lingvo kaj, pli ĝenerale, la kreola kulturo, estas pli fiere valorigata de la novaj generacioj .

Arturo



La vojaĝoj al la domo de miaj geavoj en Anglio ĉiam estas tre speciala por mi. Ili logas en granda malnova domo el ŝtono, en malgranda vilaĝo ne malproksima de Bath en la sudo de Anglio. Mi naskiĝis tie. Kiam ni alvenas, mia fratino kaj mi estas tre kontentaj ĉar ni estas kun familio, en loko kun multaj memoraĵoj. Ĉiuj parolas la anglan kaj ĉie estas tipe anglaj aferoj: la nutraĵo, la televido, la ĵurnaloj, la dekoracio, la ludoj, la radio, la butikoj k.t.p. Oni ankaŭ veturas ĉe la alia flanko de la strato.



La ĝardeno de mia avino estas mirinda. Ĝi estas tre granda kaj havas 2 etaĝojn. Ĝi havas multegajn plantojn, florojn, fruktojn kaj legomojn. La plantoj estas ĉie, do promeni en lia ĝardeno estas fabele. Ĉe la ekstremo de la ĝardeno, post grimpado de la ŝtuparoj, estas lageto en kiu svarmas grandaj fiŝoj ĉirkaŭ malgranda fontano. Antaŭe estis la lageto naĝejo sed miaj geavoj preferis havi pli da naturo. Kiam ni estis malgrandaj, ni ne povis iri proksime de la lageto solaj, ĉar ĝi estis tro danĝera. Mi ankaŭ povas rakonti pri multaj aliaj aferoj, sed eble mi devus gardi la rakontojn por la venanta fojo...

Adam

La 31-a PSI en WINTERBERG



La Pasko-semajno okazis de la 3-a ĝis la 10-a de aprilo 2015 en la mezmontara "Sauerland"-regiono en la pitoreska urbeto Winterberg de Germanio, kiu enhavas ĉirkaŭ 13 000 enloĝantojn. En la malnova centro videblas kelkaj domoj en trabfaka stilo. Okulfrapis domoj komplete kovritaj per ardezaj tabuloj diversmaniere kombinitaj. La regiono estas ŝatata pro vintraj sportoj, kion ni povis sperti. Estis ankoraŭ sufiĉe da neĝo por profiti ĝin por diversaj ludoj kaj kreado de blanka leporo.

La aranĝon partoprenis 130 geesperantistoj el deko da landoj inter kiuj multaj familioj kun infanoj de ĉiuj aĝoj. Ili tre ĝuis la renkontiĝon. La plej juna estis nur kelkmonata. Etuloj ĝuis ludadon, spektis Mazi-filmon, aŭskultis piĝamajn rakontojn kaj kreis diversajn artaĵojn. La pli grandaj kolorigis T-ĉemizojn kaj ludis tablotenison. La libroservo ofertis ampleksan elekton da diversaj libroj kaj aliajn esperantaĵojn. Eblis profiti saŭnon kaj lui biciklojn. Trinkejo ofertis diversspecajn bierojn, vinojn, aliajn trinkaĵojn kaj dolĉaĵojn.

Okazis kelkaj E-kursoj, gimnastikoj, sportoj kaj interesaj prelegoj, inter kiuj menciindas kulturo de daŭripovo, unikodo, origamio, poŝtranĉilo. Evoluiga projekto en Etiopio, raportoj pri Himalajo kaj Hindio estis akompanataj per interesaj bildoj. La partoprenantoj interesiĝis pri enkonduko al


la japana lingvo, historia vivmaniero en Litovio, okazaĵoj en nuna Ukrainio kaj ukrainaj kantoj. Estis donitaj klarigoj pri la memmasaĝo, "Yumeiho" kaj kolor-terapioj. Ni akiris informojn pri la Reta Vortaro.

Interesis kurso pri karateo kaj eblis ĉeesti ĉiutagan fizikan ekzercadon Ĉigongo kaj praktiki "Zumbon". Junuloj havis sian programon, kiu konsistis el kaosludo, turniroj kaj ĉefe el filmo-prezentoj en du ĝis kvar dimensioj. Ne mankis paskaj ovoserĉado kaj vespera fajro, kion ĝuis ĉefe la infanoj. Venis ankaŭ ĵurnalistoj por intervui kelkajn partoprenantojn kaj poste aperis artikoloj en lokaj ĵurnaloj.

Kutimaj posttagmezaj ekskursoj gvidis nin al urbogvidado, al Parko de eŭropaj bizonoj, ercminejo Ramsbeck, al amuzparks "Fort Fun". Interesa estis ekskurso al la proksima urbeto Eversberg, kie ni vizitis interesan endoman muzeon. Krome ni vizitis urbetojn Oberkirch, Hallenberg kaj Medebach. Multaj profitis belan sunan veteron por arbaraj piedpromenadoj kaj kelkaj biciklantoj malkovris vastan ĉirkaŭaĵon.

Vesperoj estis animitaj per diversaj ludoj. Ni ĝuis bingon, pupspektaklon, familian duelon inspiritan laŭ televida lud-elsendo. Tre aprezata estis vespera koncerto de klasika ĵazo prezentita de Frank Selten kaj liaj amikoj. La internacia vespero konsistis el kontribuoj de la partoprenantoj. Ni spektis kantadon de la plej malgrandaj infanoj, anekdotojn, kantojn en ukraina kaj Esperanto-lingvoj, gitar-, violon- kaj harp-ludadon. Ĉe la fino oni dankis al ĉiuj kunhelpintoj kaj kontribuintoj al la sukcesa programo. La venontjara PSI okazos en Bad Hersfeld de la 25-a de marto ĝis la 1-a de aprilo.

Liba Gabalda



Por havi ne tro da laboro renkontis foje la leporo de sia gento pliajn tri ke la sukceso estu pli. Penikon, ovon al la man' ornamo sekve estas plan'.

31a PSI

La paska renkontiĝo por la tuta familio

Winterberg
3a aprilo – 10a de aprilo 2015



Aleksandro kaj la mekanika muso



Mazi en Gondolando

10	18	42	59	67
12	19	43	50	69
1	28	FREE	54	74
3	26	40	48	61
6	17	35	55	68



PEKO 2015



PEKO 2015 okazis en Mozet komence de Majo, kaj ĝi estis sukcesa !



Ĵurnalistoj de ARTE venis unu tagon spekti la kurson de Françoise kaj intervjui kelkaj Verdaj Skoltoj.

La partoprenintoj krome manlaboris, ludis, spektis teatraĵon, mem faris bieron, kantis, partoprenis kursojn... kaj amuziĝis !

PEKO 2015 finiĝis per la vizito de la grotoj de Goyet.

